Lafonteno ŝajne forgesis
verki iun fablon…

Nu, jen farite !...

La korvo kaj la kuniklo

Iam, iu korvo, sur arbo kaŭrante,
Tuttage restadis nenion farante,

Kiam kunikleto vidante la birdon,
Alparolis tiel la nigran pigrulon :

Ĉu ankaŭ mi povus malŝpari la horojn,
Kaj ĝis la vespero kalkuli la muŝojn ?

La korvo respondis sen ajna kalkulo :
Kompreneble eblas, kara blankvostulo !

Sur l’ verdan herbaron vi rajtas eksidi
Kaj nenifaradon ekde nun profiti.

La longorelulo fideme kuŝiĝis,
Sub l’ombro de l’ arbo fine endormiĝis.

Sed baldaŭ alvenis, perflare gvidata,
Pintmuzela vulpo delonge malsata.

Tiu ĉi ne lasis forflugi la ŝancon :
Ĝi frande enfaŭke kaptis sian manĝon.

Jen la moralaĵo :

Por senĝene resti nenion farante
Pli bone vi estu sidanta plej alte !